

PENSEO

N-ro 338

dec. / 2019

Monata Beletra Revueto en Esperanto
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 30-a jaro <http://www.elerno.cn/penseo/penlisto.htm>

Eto (Ĉinio)

Decembre

Jam dufoje neĝas leĝere,
ter' aspektas brile blankpura.
Jen kaj jen aŭdiĝas sursura
vento balaante libere.

La ĉielo grizas malhele,
ŝajnas ne plu esti lazura.
Ĉion ŝlosas palo nebula,
frid' atakas homojn infere.

Arboj senfoliaj lamentas,
montoj neĝkovritaj imponas,
riverfluoĝ glaci-masonas.

Birdoj pro frostego silentas,
paŝoj sur neĝvojo knarsonas,
glacifloroj pende festonas.

Maria Nazaré Laroca (Brazilo)



Supersemajnfino en Recife

En la sama semajnfino,
jen tri radiantaj dimanĉoj
en la brazila Venecio:
literatura Recife de Clarice,
Manuel Bandeira, João Cabral...

Recife tiel simpla, kaj tiel rafinita,
senkompara sindona Recife:
akceptema patrino koro!

Mi konfesas, ke mi travivis
(pardonon, Neruda!)
momentojn de fajna ĝojo kaj ĉarmo,
kronitajn ĉe l' Esperanta Simpozio,
kiu kunigis dekojn da koroj
de gajaj brazilanoj senaĝaj,
en festo de frateco kaj kulturo!



Recife, Brazilo, 16/11/2019.

Lily (Ĉinio)

Tiu nokto

Amo nin kunligis tiun nokton.
Ekde tiam des pli kredas mi je l' amo.
Kvankam ni du jam disiĝis jen kvar
jarojn,
la sapor' de l' am' ankoraŭ restas
en profund' de mia koro.

Mi meritas punon de l' Ĉielo,
ĉar mi malantaŭ ŝi
tenis amaferon kun alia la virino
ĝis ŝi trovis la skandalon.

Kvankam nia am' rompiĝis,
mi ankoraŭ alkroĉiĝas al la amo
kun ŝi ja neforgesebla, neforgesesbla!
ĉu en la koro, ĉu spirite.

Mi memoras, ke en tiu nokto
ni kveradis arde kaj tenere,
amindumis fojrefeje,
kisis kaj brakumis kun fervoro.

Tiun nokton ni elverŝis propran koron
unu la alian kun sincero,
diri bondezirojn el la koro,
preĝi por ni ambaŭ je bonfarto.

Mi neniel tiun senton jen forgesas,
la intiman senton de la amo
de la amindum' en tiu nokto.
Ja neforgeseble, ja neforgesebla!



PAPOS NASCENTES (Brazilo)



Estu hejme

1.
solidare al folioj eldomigataj
paserparoj redonas la verdon
al arboj konsternataj
la naturo infra-homa
spiras solidarecon
— kion ni faras el si mem?

2.
irvoje kune al ni mem
sed ne enmemiĝinte
floradas solidareco
brilas floroj de naturo
per la rigard' kiu scias vidi
senti ekvidi — fine okazigi

Elena Popova (Bulgario)



STELAJ MOMENTOJ

1.
La frosta vento
ŝercas kun mi. Pinčas.
Rezisto per ŝal' .
2.
La vintro nokte
edziĝis. La ĉielo
muzikas, kantas.
3.
Malĝentila vent'
montras forton – puŝigas,
kiel stratulo.
4.
Unua neĝo.
Nebul'. Katastrofoj. Ĉu
la vintro kulpas?
5.
Feliĉa vintro
pentradas sur la tero.
Mi frostotremas.
6.
Ĉielaj steloj
ekstaziĝas. La teraj
fajras kontentaj.
7.
Vintro avara
kaŝis la blankajn vestojn.
Ĉu nin punigas?
8.
Februar' dormas
sen kovrilo. La printemp'
alvenas frue.
9.
Sen blankaj roboj
foriras nun la vintro.
Printemp' odoras.
10.
Ho, neĝas, neĝas!...
Scivolemaj galantoj

inter la neĝo.

Siv Burrel (Svedio)



De apartament' al vicdom'

De apartament' en granda dom'
ni translogiĝis al vicdom',
ricevis kontakton kun la ter',
alkutimiĝis al nova atmosfer'.

Somere sur ĉiu herbej'
infanoj gaje ludis,
biciklis, futbalis, studis,
najbaroj diris Sal! kaj Hej!

Najbaroj ofte translogiĝis
al pli grandaj belaj domoj,
sed infanoj ja grandiĝis
kaj revenis al vicdomoj—maljunaj homoj.

Wel CR (Brazilo)



Plenkviete

Kanto (tango) el la hispana jenas en esperanto laŭ mia redono. Kiel do sonas ĝi al vi? Entute, kia bildo disegniĝas viamense el la teksto? Ĝuu k. komentu.

1-a strofo

Sen ajnpeti
Sen ajnŝuldi
De vi mi foriras
Vi forgesu min
Vin mi pagis per oro
Viajn bruninajn karnojn
Ne malbenu l' sorton
Vi aventurin'

2-a strofo

Vin mi ne ŝatas
Vi min ne ŝatu
Mi neniam petis
Ajnion de vi
Ne plu diru vi ke
Ĉe mi vi nur perdis

Ĉar al mi vi estis
Nur seniluzi'

3-a strofo

Bona pag'
Vi al mi ja per bona pag'
Iĝis, kun kisa liber'
Tia sendifekta far'
Por iometa moner'
Bona pag', bona pag'
Bonpagiĝis vi "mujer"*

4-a strofo

Jes alian
Inon amas
Mi sed tio tute
Ne estas perfid'
Ŝi brakumon rifuzis
Nuran kison ŝi donis
Kaj estis ĝi kiso
Sen paga devig'

5-a strofo

Sen ajnpeti
Sen ajnporti
Formortu ĉi-ĉambre
Nia histori'
Kaj afliktoj kaj ĝojoj
Ĉio de niaj horoj
L' juvelojn profitu
Por nova pasi'

6-a strofo

Bona pag'
Vi al mi ja per bona pag'
Iĝis, kun kisa liber'
Tia sendifekta far'
Por iometa moner'
Bona pag', bona pag'
Bonpagiĝis vi "mujer"



* *mujer /muĵer' / hispane por ino.*

Charles Bukowski


INO KAJ VIRO EN LA LITO

JE LA DEKA VESPERE

Mi havas senton, kvazaŭ mi estus
skatolo de sardinoj en oleo, ŝi diris.
Mi havas senton, kvazaŭ mi estus
el leŭkoplasto, diris mi.
Mi havas senton, kvazaŭ mi estus
pantranĉaĵo kun tinuso, ŝi diris.
Mi havas senton, kvazaŭ mi estus
striita tomato, diris mi.
Mi havas la senton, ke
pluvos, ŝi diris.
Mi havas la senton, ke la horloĝo
haltis, diris mi.
Mi havas la senton, ke la pordo
ne estas fermita, ŝi diris.
Mi havas la senton, ke tuj envenos
elefanto, diris mi.
Mi havas la senton, ke ni devus pagi
la luprezon, ŝi diris.
Mi havas la senton, ke ni devus serĉi
laboron, diris mi.
Mi havas la senton, ke vi mem
devus serĉi iun, ŝi diris.
Mi havas la senton, ke mi ne volas havi
iun, diris mi.

Mi havas la senton, ke mi estas egala
al vi, ŝi diris.
Mi havas la senton, ke ni
foje gedormu, diris mi.
Mi havas la senton, ke ni faras tion
tro ofte en la lasta tempo, ŝi diris.
Mi havas la senton, ke ni faru tion pli ofte,
diris mi.
Mi havas la senton, ke vi prefere
serĉu laboron, ŝi diris.
Mi havas la senton, ke vi
serĉu iun, diris mi.
Mi havas la senton, ke mi bezonas
drinkaĵon, ŝi diris.
Mi havas la senton, ke mi bezonas

botelon da viskio, diris mi.
Mi havas la senton, ke pli ol
vino ne eblos, ŝi diris.
Mi havas la senton, ke vi
pravas, diris mi.
Mi havas la senton, ke mi
reziĝnas pri tio, ŝi diris.
Mi havas la senton, ke mi bezonas
banadon, mi diris.
Mi havas la senton, ke vi
efektive bezonas banadon.
Mi havas la senton, ke vi
brosu mian dorson, mi diris.
Mi havas la senton, ke vi
ne amas min, ŝi diris.
Mi havas la senton, ke mi
tamen amas vin, diris mi.
Mi havas la senton, ke via kaco
nun estas en mi, ŝi diris.
Mi havas la senton, ke mia kaco
efektive estas en vi, diris mi.
Mi havas la senton, ke mi nun
amas vin, ŝi diris.
Mi havas la senton, ke mi amas vin pli
ol vi min, mi diris.
Mi havas la senton, ke tio estas tiel bela,
ke mi tuj devos krii, diris ŝi.
Mi sentas, ke mi daŭrigu tion
plej prefere por ĉiam, mi diris.
Mi havas la senton, ke vi
eĉ kapablus tion, diris ŝi.
Mi havas tioman senton, mi diris.
Ankaŭ mi, diris ŝi.



Esperantigis



Hans-Georg Kaiser
(Germanio)

lingve kontrolis Vladimir Türk

Mimoza Ahmeti



Mi kredas

Je vi mi kredas
Je via vira revo mi kredas
Kiu ŝarĝita estas
Kvazaŭ neĝa tero dum la vintra kulmino
Kvazaŭ birda ĉielo dum la suna kulmino.

Je vi mi kredas
Viajn manojn sekiĝi vi ne lasas
Kiel du hakitaj arboj demalsupre
Vian penson putriĝi vi ne lasas
Ĝin vi ne konservas
En la kasedo ne ŝanĝas
Ĉar nek la kasedo, nek la ĉambro, eĉ nek via
kapo
Apenaŭ kapacitas vian penson. Ne!
Per pezaj flugiloj via penso
Spacon volas, aeron volas.

Via penso homojn volas.
Via fantazio la naturon hastas
La decidiga irado sekuran vojon promesas.
Via rigardo havas pacon. Liberon havas.

Vi ridas
Kaj, disde la suferoj pro bagatelaĵoj, min
skuas.
Vi mornas
Kaj mi la kontraŭŝtormon koncentrigas.
Pro febroj por konsciiĝo ni suferas.
Enmane la vizaĝon mi prenas
Tiom amata, tiom lumokula kaj milda,
Tiom forta, tiom osteca,
Vian vizaĝon mi karesas,
Vian vizaĝon mi volas,
Al ci mi kredas:
Cia karaktero la provŝtonon diserigas.

Nasko

Ĉu ci skribita aŭ ne estos ?
Aŭ ci ene de mi ekbolos,
Ci verso, ci vivo, ci verso- vivo mia ?

Ci estas sklaviginta min, tiom forte alpremite
Per cia superfluiga likvaĵo tra la vejnoj.

Tagoj...horoj..minutoj...surpapere
Denove mi apenaŭ eligas cin sendolore, ne.
Malfacila nasko, danĝere.

Ĉu la patrino survivos? Aŭ la bebo mortos?
La patrino ne mortos. La bebo survivos.
Por ke kreskiĝu morgaŭ buŝalbuŝe.

Fantazio

Eliru mi ĉivespere ĉirkaŭ la noktomezo,
Kiam la stratoj enpacas, plenfortas la silento...

La ĉiupotenca nokto en sia stato
Flua
Kiel venta flugilo, libera, alkuru mi

Ondiĝu mi en la ruĝkolora flamo
Forskuu la urbon, la homojn veku,
Tri horojn anticipe la mallumon tagigu.

Kaj kiel mi eligu ĉiujn
Tra la ŝutroj kaj pordoj,
Insultantaj kaj alkriantaj min
Pro la rompita kvieto,
Nomante min
Facilanima kaj freneza,
Mi aldiru: Hej, 711 dormoperdintoj,
Estas varma nokto, kun soifaj steloj,
Estas ne por dormi nokto!

Elalbanigis



Bardhyl Selimi

(Albanio)

El Ĉina Antikva Poezio

Zhang Bi (? - ?)

Letere al la memorato

Post la disiĝo, pri l' knabino sonĝe mi sopiras:
Enkorte l' galeri' kun balustrad' zigzage iras.
Nur la printempa luno amoplana nun ankoraŭ,
Por mi, la afliktat', sur la falintajn florojn
brilas.

Zhang Hu (ĉ. 785 – ĉ. 849)

Dediĉe al honordamo

Super palacaj pordoj kaj arbaro
La luno kalme velas senbalzame;
Alloga, ŝi rigardas nur al nesto,
En kiu geardeoj noktas ame.
La jadopinglo eltirita el hararo
Oblikve sin reflektas sur lampbrilo, -
Ŝi forflankigas noktopapilion
Por savi ĝin de l' flamo de lumilo.

Liu Fangping (? - ?)

Plendemo en printempo

La gazfenestroj dronas en krepusk' ĉe
sunsubiro,
Neniu vidas min larmadi en la buduaro.
Finiĝos tuj l' printempo en la korto dezerdeca:
Post la fermita pordo flirte falas pirfloraro.

Liu Yuxi (772 – 842)

Responde al la poemo de Bai Juyi

Ŝminkinte sin, descendas ŝi de sur l' etaĝo
ruĝa, —
Ŝlosiĝas en ĉi trista korto la printempa belo.
Kun spleno l' belulino tie nombras freŝajn
florojn,

Sur ŝian jadan haropinglon flugas jen libelo.

Bai Juyi (772 - 846)

Poemo por honordamo

Kun la larme malseka mantuko ŝi ne
endormiĝas,
Noktomeze el ĉambro antaŭa aŭdiĝas
kanthoro.
La favoro de reĝo rompiĝis, kun freŝa vizaĝo
La belino ĉe la incensujo sidas ĝis aŭroro.
Elĉinigiŝ



Minosun (Ĉinio)

Sima Guang (1019-1086)

Belulino

—laŭ melodio *Luno super okcidenta rivero*
Kun loz-plektita hartubero sur verto,
ŝi portas vangojn pudre ŝminkitaj.
Flirtanta rob'el tul' sur korp-svelto
reliefigas ŝin per movoj ekscitaj,
kun paŝoj kvazaŭ filament' de necerto.

Ĉifoja renkontiĝ' malplias ol nenia vidiĝo,
la korinkilno ja signifas nulon de nulo.
Jen fine de muzika prezentad' ebriiĝo
forpasis, ŝi sobriĝas iom jen el vin-brulo.
Nur restas la kvieta korto en lunlum-lulo.

Wang Anshi (1021-1086)

—laŭ melodio *Sudlandano*

De antikveco oni fondas
ĉi tie la palacon imperian,
ĉar verd' de arboj, herboj ondas
sub la vualo de l' vapor' favora.
Ve, malfeliĉe oni desaporas
pri neniig' de l' kvarcentjara sonĝo.
Jam korteganoj mortis vane,
iliaj tomboj grege sin renkontas.

Promenas mi laŭ riverbordo,
 kaj mi ascendas turon
 etaĝon post etaĝo kun streĉita forto.
 Pri l' historiaj faktoj de la dinastioj
 ne nepre ĉuu ja laŭ ordo.
 Direktu jen rigardon vian al la Longa
 Rivero,
 kiu senĉese fluas malgraŭ ĉies sorto.

—laŭ melodio *Budhista dancisto*

Kelkaj pajlkabanoj jen rigardas
 rivereton en senĝena fluokuro.
 Mi vestite en negliĝo, kun malalta ĉapo,
 paŝas inter plorsalikoj en vent-lulo.
 Floroj same ruĝas kiel lastajare,
 nokta printemp-vent' karese blovas
 ilin jen al disflorado en plezuro.

Kiam la lunark' leviĝas al zenito,
 alte super arbopintoj,
 mi sobriĝas en malrapido
 pro tagmeza la drink-ebriiĝo.
 Kion mi prizorgas en medito,
 kun amemo? Nur sufiĉas unu aŭ du
 pepoj de la oriolo en ekscito.

Yan Jidao (1030?-1106?)

—laŭ melodio *Feo ĉe rivero*

Vekiĝinte el la sonĝo trovas mi,
 ke ŝlositas ĉiuj pordoj supre.
 Kiam mi sobriĝas el ebri',
 la kurtenoj pendas jen malalte.
 Lastajare la printempa apati'
 ree venas al mi en la koro.
 Dum florfalad' mi kun konsci'
 sentas min izola ja des pli.
 En subtila pluvo paro da hirundoj
 tamen flugas ame kun pasi'.

Je l' unua fojo mi ekvidis ŝin
 en aroma rob' el luksa silko.
 Ŝi, ludante bivon, kun kapklin'
 kantis amrakonton dolĉe.
 La tiama lun' ankoraŭ min
 nun prilumas sur ĉielo,


dume tiutage ŝi reiris hejmen
 same sub la luna ilumin'.

—laŭ melodio *Perdrika ĉielo*

Tenante jadan tason ambaŭmane
 vi jen proponis al mi komplezeme
 vintrinkon, en vestaĵo luksa,
 kun mola sent' ekstreme.
 Mi spite ebriiĝon unuglute
 fintrinkis vinon sendileme
 ĝis ruĝis la oreloj.
 Vi dancis, dancis ja senĝene
 ĝis lun' malalten sinkis
 al saliksuproj skuiĝantaj treme.
 Finiĝis la kantad' mi eĉ ne povis
 svingeti ventumilon fortosvene.

Ekde disiĝo mi sopiri emis
 renkonti vin kun ĝoja sento.
 Kelkfoje ni kuniĝas eĉ en mia sonĝo,
 ĉu havas samon vi dum la momento?
 Ĉinokte vere ni kunestas longe,
 babilas sub lamplum' en evidento,
 sed ni l' okulojn streĉas
 por vidi zorge kun atento,
 timante, ke ni renkontiĝus
 vizie en la sonĝ' prezento.

Elĉinigiŝ *Veĵdo (Ĉinio)*



Zhuangzi

ĈAPITRO DUDEKA

Monta arbo

§20-03

Beigong She kolektis mondonacojn al la
 duko Ling de la regno Wei por fari kompletan
 da sonoriloj. Komence li ordonis fari terason
 ekster la pordego de la ekstera urbomurego,

kaj en tri monatoj la kompleto da sonoriloj estis finita.

La princo Qingji vidis Beigong She kaj demandis tiun:

“Kian procedon vi uzis por tio?”

“Mi koncentris min sur tion. Jen ĉio,” respondis Beigong She. “Mi aŭdis popoldiron: ‘Kio estas skulptita kaj polurita, revenas al sia simpla natura stato.’ Simpla kaj senscia, mi pensis pri nenio kaj havis neniajn dubojn. Antaŭ la homoj, kiuj kolektiĝis, mi restas kvazaŭ senklara. Mi bonvenigis tiujn, kiuj venis, kaj diris adiaŭ al tiuj, kiuj foriris. Mi ne malakceptis tiujn, kiuj venis, kaj ne retenis tiujn, kiuj foriris; mi ne devigis tiujn, kiuj ne volis mondonaci, kaj akceptis egale, kiom ajn oni donacis. De ĉiu laŭ lia volo kaj lia kapablo, mi kolektis mondonacojn de la mateno ĝis la nokto, farante nenian malutilon al la homoj, por ne paroli pri tiuj, kiuj sekvas la Taŭnon.”

§20-04

Kiam Konfuceo estis sieĝita inter la regno Chen kaj la regno Cai, li ne ekbruligis fajron por kuirado dum sep tagoj.

Iu maljunulo nomata Ren iris al Konfuceo por esprimi al li sian simpatian.

“Majstro,” li diris, “ĉu vi jam estas ĉe la rando de la morto?”

“Jes,” diris Konfuceo.

“Ĉu vi timas la morton?” demandis Ren.

“Jes,” diris Konfuceo.

“Lasu do al mi rakonti al vi pri la vojo al la senmorteco. En la Orienta Maro troviĝas speco de birdo nomata Yidai. Flosante kaj glitante super la oceano, tiuj birdoj ŝajnas senkapablaj. Ili flugas en aro kaj ripoze sidis flanko ĉe flanko. Ili ne kuraĝas flugi antaŭe aŭ malantaŭe de la aliaj. Sin nutrante ili ne kuraĝas fari la unuan mordon kaj ĉiam manĝas la restaĵojn de nutraĵo. Rezulte de tio, neniu el ili estas forpuŝita el la aro aŭ atakata de aliaj estaĵoj. Jen kial ili neniam estas en danĝero.

“La arbo, kies trunko estas rekta, estas la unua hakfaligita; la fonto, kies akvo estas

dolĉa, estas la unua elĉerpita. Vi intence akriĝas vian saĝecon por mirigi la stultulojn, kulturis vin mem por reliefigi alies malbonecon, kaj paradis per viaj kapabloj, kvazaŭ vi marŝus tenante la sunon kaj la lunon en viaj manoj. Jen kial vi ne povas eviti danĝeron. Mi iam aŭdis diron de Laŭzi: ‘Tiu, kiu sin gloras, akiros nenian meriton; tiu, kiu lasas sin ebriigi de siaj sukcesoj, venos al sia ruiniĝo; tiu, kiu ripozas sur sia famo, suferos perdojn.’ Kiu do povas rezigni siajn meritojn kaj famon kaj rekuniĝi kun la ordinara popolo? Por tia homo, la Taŭno regas sed ne sin rivelas, kaj la virto disvastiĝas sed ne sin elmontras. Simpla kaj ordinara, li estas preskaŭ malsaĝa. Lasante nenian postesignojn kaj tenante nenian pozicion, li laboras nek por merito, nek por famo. Li postulas por si nenion de iu ajn, kaj neniu postulas ion ajn de li.

“La perfekta homo estas nekonata al la mondo. Majstro, kial do vi tiel plezure serĉas vian famon?”

“Bone dirite!” diris Konfuceo.

Kaj li forlasis siajn amikojn kaj forsendis siajn disĉiplojn kaj retiriĝis al la granda marĉejo. Li vestis sin per krudaj vestoj kaj nutris sin per sovaĝaj fruktoj. Kiam li promenis inter la kvarpieduloj, la kvarpieduloj ne diskuris pro timo. Kiam li promenis inter la birdoj, la birdoj ne disflugis pro timo. Kiam la birdoj kaj la kvarpieduloj ne abomenis lin, kiel do la homoj povus havi abomenon kontraŭ li?

§20-05

Konfuceo demandis Zisang Hu, dirante:

“Mi estis dufoje forpelita el la regno Lu; mi estis ofendita en la regno Song, kie la arbo, sub kiu mi faris prelegon, estis hakfaligita; mi estis forpuŝita el la regno Wei; mi estis reduktita al la lasta ekstremo en la regno Shang kaj la regno Zhou; mi estis sieĝita inter la regno Chen kaj la regno Cai. Mi suferis tiom da malfeliĉoj. Miaj parencoj kaj malnovaj amikoj forlasis min; miaj disĉiploj kaj novaj amikoj pli kaj pli malintimiĝas de

mi. Mi volus scii, kial ĉio ĉi tio okazis al mi.”

“Ĉu vi ne aŭdis la rakonton pri homo, kiu fuĝis el la regno Jia? Tiu homo, kiu estis nomata Lin Hui, forlasis sian multevaloran jadon kaj forkuris portante sian tre junan filon sur sia dorso. Iu lin demandis: ‘Ĉu vi, tiel agante, konsideras la monon? Sed la infaneto ja ne estas multevalora. Ĉu vi konsideras la ŝarĝon? La infaneto ja estas multe pli peza, ol la jado. Kial do vi forlasis la multevaloran jadon kaj forkuras portante la infaneton sur via dorso?’ Lin Hui respondis: ‘Tio, kio ligas la jadon kun mi, estas profito. Tio, kio ligas la infaneton kun mi, estas la rilato de la naturo.’

“Tial tiuj, kiuj ligas sin reciproke per la profito, forĵetas unu la alian en la tempoj de mizero, malfeliĉo, katastrofo kaj danĝero, dum tiuj, kiuj ligas sin reciproke per la naturo, al kroĉiĝas unu al la alia en tiaj tempoj. Estas granda diferenco inter la reciproka al kroĉiĝo kaj la reciproka forĵeto! La amikeco inter la nobluloj estas pura kaj sengusta kiel akvo; tiu inter la vulgularoj, dolĉa kiel bongusta vino. La sengusta pureco pliintimigas la interrilatojn, dum la bongusteco ilin rompas. La rilatoj inter la vulgularoj komenciĝas pro nenia pravigebla kaŭzo kaj finiĝas same senkaŭze.”

“Mi aŭskultas viajn instruojn kun respekto,” diris Konfuceo.

Kaj per malurĝaj paŝoj Konfuceo revenis kun sia menso en facileco. Li metis finon al siaj studoj kaj forlasis siajn librojn. Liaj disĉiploj ne plu faris laŭritajn riverencojn antaŭ li, sed ilia amo al la majstro konsiderinde kreskis.

En iu alia tago Zisang Hu diris:

“Sur sia mortolito la reĝo Shun diris al la reĝo Yu: ‘Estu singarda kaj notu miajn vortojn! Por via fizika formo nenio estas pli bona ol la konformiĝo al la naturo; por via dispozicio nenio estas pli bona ol la sincereco. Se vi konformiĝos al la naturo, vi ne perdos viajn naturajn trajtojn; se vi estos sincera, vi ne

lacigos vian koron. Kiam vi ne perdos viajn naturajn trajtojn, nek lacigos vian koron, vi ne bezonos aparte zorgi pri via fizika formo. Kiam vi ne bezonos aparte zorgi pri via fizika formo, vi nature ne dependos de la eksteraj estaĵoj.’”

Elĉinigi



Wang Chongfang

(Ĉinio)

Ĉineske

Vejdo (Ĉinio)



Mangigi veston

el rakontoj pri Afanti

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Afanti

iris al festen’,
en eluzita vesto,
ĉe la amika ĝarden’
ĝojplene sen ĝen’.

L’ amik’ lin
vidis kolere
jen trivite vestitan.
Li timis mokon vere
kaj lin prefere

irigis
el hejmo sia.
Afanti hejmeniris,
ŝanĝis laŭ plaĉo lia
kaj vid’ glacia

nov-veston.
Kiam l’ amiko
vidis la belan veston,

li ĝojis kun ciniko,
kun bona psiko.

Invitis
nun kun fervoro
Afanti al honorlok',
regalis kun bonvolo
lin kun ridfloro.

Li montris
manĝaĵojn bonajn
al Afanti kompleze
kaj faris vinproponojn
kaj pervad-spronojn.

Afanti
direktis ŝove
manikon al manĝaĵoj,
dirante: "Laŭbontrove
manĝu plejpove

frandaĵojn,
ha, nova vesto!"
La mastro surpriziĝis
kaj ĉuis kun protesto:
"Kion la gesto

signifas,
amiko kara?"
Afanti jen respondis:
"Mi ne estas erara
nek ag-bizara.

Jen vidu,
mi ja direktas
novan veston al manĝad',
kiun vi plej respektas
kaj ne neglektas!"



Miric Jadranka (Serbio)



Vivo unikas

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Juneco
prilongigita
per amo brakumita.
De malbono savita.
Amo benita.

Rideta
vizaĝ' radias.
Parolas. En okuloj
feliĉon speguliĝas.
Animo spiras.

Malantaŭ
ĉies granda kor'
staras do, fideleco,
staras jaroj da labor'
por milda, bonkor'

Facilas
divorciĝi. Am' ?
La vivo lernigas nin.
Ne hontiĝu vi de am'.
Rezignu de lam'.

Espero
amo kaj kredo
postulas ĉion de ni,
de kapo ĝis piedo!
Ekridu ni, do!



Luiza CAROL (Israelo)



Sopiro en novembro

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Alvenas

la birda paro

al suda varma insul’.

Parfumas foliaro,

ĝojas idaro.

**Sopir-al-sudo (ĉine: Yijiangnan): ĉina fiksfirma poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimaranĝo xa,xa,a (x=senrima)*

Yanke (Ĉinio)

Neĝas nun

—laŭ ĉinesko Dekses-Silabo*

El

la nubkovrita ĉiel’

faladas

neĝo en ventpel’.

Vent’

kirlas el la okcident’

neĝerojn

en flirta prezent’.

Sur

la tero sterniĝas pur’

de blankneĝ’

jen kiel velur’.

Mond’

tuj mutas en frosta ond’

en sia

al neĝo rekont’.

Jam

ne pepas kiel iam

birdparoj

en kverad’ de am’

En

stratoj paŝas en promen’

ne homoj

en neĝa katen’.

Lud’

infana en neĝa krud’

vidiĝas

en en ĉi minut’.

Nur

en domo fajr’ kun sursur’

varmigas

je homa plezur’.



**Dekses-Silabo: ĉina fiksfirma poemo el kvar versoj de 1, 7, 35 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,xa (x=senrima)*

Lin Qingxuan (1953-2019)



La sunlumaodoro

La tumulta bruego de la homa mondo forgesigas al ni la odoron de la sunlumo, la saman odoron, kiu subtile kaj delikate penetras en niajn koron kaj pulmojn, tiom dolĉan, aroman kaj plaĉan. La sunlumo elspiras tre puran kaj estetikan odoron, tiel travideblan, koncizan kaj rafinitan, kiel la noveloj verkitaj de

